



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

XVII KONGRESO DE K. E. F.

XVI INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Ripoll — Pentekosto 1935.

La malakurata apero de nia organo, kies kaŭzojn ni menciis en nia lasta numero, devigas nin prokrasti ĝis Pentekosto de 1935 la anoncitan Kongreson. Sen tiu prokrasto la Kongreso, kiu ni havis ĝustatempan propagandon, ne povus sukcesi.

La samon ni devas diri pri la Internaciaj Floraj Ludoj, kies Alvoko aperis en la januara numero, elveninta en majo. Al la partoprenontoj ni avertas, ke oni akceptos la manuskriptojn ĝis la 31-a de decembro.

Kongresa Komitato en Ripoll

Prezidanto: Sro. Antoni Planas, str. Ragull, 2.

Sekretario: Sro. Eudald Canelles, str. Grivolosa.

Kasistino: Fino. Anna Verdaguer.

Voĉdonantoj: Sro. Josep Estivill, fino. Angels Casadesús,
kaj fino. Dolors Mora.

Manuskriptojn por la Internaciaj Floraj Ludoj sendu al la redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO sub la nomo de Sro. Joan Gili Norta, str. València, 245, Barcelona.

XVII CONGRES CATALA D'ESPERANTO

Per les causes que anotàvem en el número anterior no hem pogut publicar amb puntualitat el nostre organ KATALUNA ESPERANTISTO. Això ens obliga a ajornar per a l'any vinent la celebració del Congrés que teníem anunciat a Ripoll. No era possible celebrar els Jocs Florals sense donar un marge de temps suficient a tots aquells autors de terres llunyanes que col·laboren en la Gran Festa dels Congressos Catalans d'Esperanto. Un Congrés sense els Jocs Florals Internacionals perdria el seu principal atractiu, deixaria de tenir el relleu internacional que adquireixen els nostres Congressos, gràcies a la participació d'esperantistes de fama que veuen en la nostra festa literària el camí ascendent dels nous valors internacionals.

Es per això, doncs, que el XVII Congrés Català d'Esperanto, d'acord amb el Comitè Organitzador de Ripoll, ha estat ajornat fins a la Pasqua de 1935. Aquest ajornament no significa de cap de les maneres una minva d'entusiasme ni una pèrdua de posicions. Tots mantenim amb fe les essències de l'ideal esperantista i aquest ajornament ha d'ésser aprofitat per a afermar els resultats dels cursets Cseh celebrats a diferents indrets de la nostra terra.

Per tal de complir els preceptes reglamentaris de la Federació, el dia primer de juliol se celebrarà l'assemblea general de socis. Cal que tots els defensors de la Federació Esperantista Catalana hi assisteixin com un sol home, no solament per complir amb els més elementals principis de tot bon esperantista, sinó per exigir-ho la importància dels temes que s'han de tractar i que afecten la nostra posició davant la nova organització esperantista universal per una banda i la necessitat d'estructurar d'una manera pràctica l'organització nacional per l'altra.

Que cada lector sigui un defensor de la Federació i que cada federat treballi amb entusiasme per l'engrandiment de la Federació.

ASSEMBLEA GENERAL DE SOCIS

El dia primer de juliol, a les deu del matí, tindrà lloc al nostre estatge, València, 245, entresol, l'assemblea general reglamentària de socis.

Per la importància dels assumptes a resoldre cal que hi assisteixin tots els federats.

LA ŜNURTIRO

de M. E. Francis

Estis frua tagiĝo kiam Poŝtisto Kando ekiris por fari sian matenan rondvojaĝon, kaj multaj el la vilaĝanoj ankoraŭ ne leviĝis. En kelkaj domoj la flagranta lumo de ĵus-bruligita fajro montris ke iu dommastrino jam ellitiĝis, kaj preparas la nutraĵon, kiun manĝos edzo aŭ filo antaŭ ol foriri al kampoj, kiuj, en tiu milda, sudlanda februaro, estis kovritaj per nehela brilo de malsekeco. La poŝtisto jam manĝis pli grandan nutraĵon ol la ordinara matenmanĝo, ĉar lia rondvojaĝo estos longa, kaj li revenos nur je la meztagmanĝa horo. Tiun manĝon li mem preparis sufiĉe nelerte, per la helpo de malgranda, malbonodora oleforneto. Post nelonge, najbarino envenos por ordigi la domon kaj prepari la tagmanĝon; poste li iom ripozos, kaj fosos en sia ĝardeneto ĝis venos la horo, kiam li devos ekiri por la vespera rondvojaĝo. Jen vivo sufiĉe simpla, kaj soleca; de kiam lia maljuna patrino «transloĝiĝis al la Nova Domo», alivorte foriris al la postmorta mondo, li pasigis senkomfortan ekzistadon. Tamen Poŝtisto Kando ŝajne estis kontenta, kaj, kiam bonintencaj amikoj konsilis edziĝon, respondis ke pro tio, ke li prosperis sufiĉe bone sen edzino ĝis sia nuna matura aĝo, ŝajnus iom riske komenci jam serĉi tiun. Li diris ke li scias kiam li estas bonstata, kaj li ne scias kio okazus se li farus eksperimenton je tia vivtempo — opinio pri kiu Srino. Adlem, la najbarino kiu mastrumetis por li, tutkore konsentis.

Forlasinte la vilaĝeton, kaj marŝante vigle laŭ la kota ŝoseo, Kando dum kelka duonhoro restis sola. Ambaŭflanke de la senfoliaj kreskbariloj etendis sin arĝentkolora paŝtejo, aŭ nove plugitaj kampoj; en tiuj ĉi kelkaj dormemaj frugilegoj jam laboris, dum la paŝtejo ankoraŭ estis malplena, ĉar la bovinoj estis kolektitaj en la staloj por melkado, kiu en Dorset estas farata frue, ofte antaŭ taglumo. Tamen okaze, la malproksima voko «Ŭo-op, ŭo-op!» montris ke iu energia melkisto klopodas forpeli denove sian zorgitaron. Birdoj sin okupis en la kreskbariloj, farante la matenan tualeton kun multe da pepado, kaj malgrandaj susuroj kaj flugetoj.

Kiam la suno montris sin super la horizonto, la poŝtisto ĉirkaŭrigardis, kun la trankvile observanta mieno de tiu, kiu kutimas rimarki bagatelajn okazojn.

La junaj salikoj jam ruĝiĝis, kaj etaj lanugaj florkvastoj

komencis eligi el siaj volvaĵoj. Turdo kantis vigle sur la branĉoj de ulmo, kiu pendis super la vojo.

«La printempo alvenos antaŭ ol ni ekatendos ĝin», diris Poŝtisto Kando kun surprizita mieno. Ankoraŭ ne pasis dek tagoj de kiam fluidiĝis la lasta neĝo, tiu nekutima neĝo kiu venas tiel malofte al Dorset ke la loĝantoj en tiu favorata distrikto emas senti sin ofendataj pro eĉ okaza vizito; kaj jen la herbo ekkreskas laŭ la vojborde, kaj la deklivo sub la salikoj estas kovrita per kelidonioj.

Li daŭrigis mediti pri la ŝanĝemo de teraj aferoj, precipe de la vetero, ĝis li atingis Chudbury, vilaĝo tra kiu li ofte pasis ne liverante eĉ unu leteron, sed kie, je tiu speciala tago, li devis senigi sin efektive je tri; unu ĉe la paroĥestro, unu ĉe Sro. Diglo, gastejestro de la «Ruĝa Bovino», kaj poŝtkarton por Fino. Florenc Inkpen — poŝtkarton kun kelkaj linioj skribaĉitaj de nelerta mano, kaj vico da krucoj sur unu angulo.

Suzano Bojt, onklino de Fino. Florenc, genuis apud la pordŝtupo, frotante ĝin laŭ tuta povo, kiam la poŝtisto haltis apud ŝi. Ŝi estis mezaĝa virino, kun ronda, bonhumora vizaĝo, ĉirkaŭata da aroj da malnovmodaj bukloj. Ŝi portis katunan veston kaj grandan antaŭtukon, kaj laboradis tiel vigle ke eĉ je tiu horo ŝia vizaĝo ardis kiam ŝi ekrigardis supren al Kando.

—Mi alportis ion hodiaŭ por ĉi tiu domo — diris li, etendante inter fingro kaj dikfingro la poŝtkarton.

—Por mi? — ekkriis Suzano, eksidiĝante malantaŭen sur la kalkanoj kaj avide etendante grasetan manon.

—Ne, ne — respondis Kando—. Ĝi estas por unu el la junulinoj — de amanto, mi supozas — ĝi surtenas tiel multe da kisoj kiel mi neniam vidis!

—Mi nur ŝercis, kiam mi demandis ĉu ĝi estas por mi — klarigis rapide Suzano, kvankam ŝia vizaĝo malheliĝis.

—Mi pensas, ke mi neniam alportis al vi leteron, ĉu, Fino. Bojt? — demandis ridete la poŝtisto.

—Ne, tion vi ne faris. Mi vere estus fiera se vi alportus unu al mi — respondis Suzano kun malgaja rido—. Nu, mi konfesas, mi neniam ricevis leteron dum la tuta vivo, kaj neniam ricevos.

Tion dirinte, ŝi denove genuis kaj rekomencis la frotadon. Poŝtisto Kando ne estis rapidema, kaj je tiu ĉi okazo li estis tiel amuzata per la konfeso de Suzano, ke li restis por paroli iom plu pri la temo.

—Vi neniam dum la vivo ricevis leteron? — li repetis kun amuzata tono—. Nu do, mi apenaŭ povas kredi tion.

—Tamen tio estas vera — respondis Suzano, denove pozigante sin sur la kalkanoj—. Nu, kiu volus skribi al mi? — ŝi naive demandis.

—Ĉu vi ne havas amikojn, krom tiuj, kiuj loĝas en ĉi tiu vilaĝo? — demandis Kando.

Suzano medite gratis la kubuton per la neokupata mano antaŭ ol respondi:

—Nu, mi supozas ke mi havas amikojn same kiel aliaj, sed ili neniam skribas al mi, ĉu vi komprenas? Ili skribas al mia fratino, aŭ al unu el la junaj knabinoj. Ho, Florenc kaj Mabel ricevas multajn leterojn, sed—ne, mi ne povas memori ke iu iam havis la ideon skribi al mi.

—Ve, ve, virino! Vi ne diras ke vi neniam ricevas eĉ kristnaskan karton?

—Je-es, mi ja okaze ricevas kristnaskan karton — diris Suzano—, sed oni ne ĝenas sin sendi tion per la poŝto. Oni nur transpaŝas trans la vojon por alporti ĝin. Kiam mi ricevas kristnaskan karton — ŝi aldonis, post momenta plua pripensado—, ĝi ordinare venas de unu el miaj nevinoj. Mi ofte ridas al mi, poŝtisto — ĉi tie ili ne alte estimas min, vi scias, kaj mi aŭdas ilin diri: «Jen, tiu taŭgas por la onklino» — kaj ĝi kutime estas iu, kiu iom malpuriĝis, vi scias, aŭ difektiĝis ĉe la anguloj.

—Nu, mi ja pensas tion hontinda — ekkriis varme la poŝtisto—. Kiel ili status sen vi, diru al mi tion? Estas vi, kiu faras la plimulton de la domlaboro, ĉu ne?

—Jes, vere — konfesis Suzano—. Mia fratino estas iom nesanema, vi scias, kaj la knabinoj — nu, ili estas ankoraŭ junaj. Mabel okaze helpetas min, je-es, Mabel estas bona knabino — kaj tia ankaŭ estas Florenc — mi tute ne plendas pri ili. Ho, mi ne malŝatas la laboron, Sro. Kando; mi ĉiam emis labori; kaj estas juste ke mi faru ion por pagi la vivrimedojn. Certe, mi ne scias kio mi fariĝus, se mi ne loĝus ĉe la fratino. Ŝi donas al mi eĉ la vestojn kiujn mi surportas.

—Vi povus facile trovi laboron aliloke, kaj ankaŭ ne tiel malfacilan laboron — rediris Kando—. Ne fiksiĝu en la ideo, ke vi ŝuldas al Sino. Inkpen, estas la malo, laŭ mia opinio. Nu mi devas foriri. Eble mi portos al vi leteron unu tagon por surprizi vin, fraŭlino Bojt,—li aldonis ŝerce.

—Tio ja estus surprizo — respondis Suzano, kun tiu sama

bonhumora, sed iom malgaja rido kun kiu ŝi antaŭe faris tiun saman dirajon. — Mi estus fiera, treege—, ŝi aldonis dum li foriris ride laŭ la ŝtonpava vojeto, swingante la sakon sur la brako.

—Kompatindulino! Mi estas certa, ke ŝi estus fiera — diris al si poŝtisto Kando, kiam, trapasinte la pordegon, li rekomencis la marŝadon laŭ la kota vojo, ankoraŭ meditante pri la ĵus-farita parolado.

—Imagu, ke ŝi neniam ricevis per la poŝtofico eĉ kristnaskan karton! — Nu, nu! Neniam leteron kun poŝtmarko! Konsernas min pensi ke iu kreitaĵo estas subpremata tiamaniere. «Tiu taŭgas por onklino!» efektive! — kaj tiuj impertinentaj knabinaĵoj elektas el la kartoj tiun, kiu estas tre malbona por doni al iu alia. Mi volas, ke iu sendu al Suzano Bojt nur unufoje taŭgan leteron. Mi preskaŭ volas mem fari tion — sed la kompatinda virino hontus, se mi skribus al ŝi post ŝia rakonto. Ne, oni devas sendi anonime leteron, kaj divenigi ŝin. Ho! — jen la faraĵo.

Li haltis sur la mezo de la kota vojo por ridi laŭplaĉe, kaj la nekutima sono ektimigis emberizon, kiu ĝis nun rigardis sentime lian alvenon, sidante sur fosto de kamp-pordo. Ĝi jam flugis kriante trans la vojon, sekvate de alia birdo samspeca.

—Jen paro — komentis Kando—, ili komencis frue, tiuj du. Mi pripensu; lundo estis la naŭa — ne tre frue efektive; hodiaŭ estas la dektria — alproksimiĝas la tago de Sankta Valentino, SANKTA VALENTINO! Jen ideo!

Li denove swingis la sakon por ke li povu emfazigi sian ĝojon, frapante ion pli resonantan ol lia femuro. Brilanta ideo lin kaptis. Li sendos al neestimata Suzano Bojt valentinon. Ne necesos subskribo, eĉ nek ia skribo; li nur enmetu ĝin en koverton, kaj adresu ĝin per presliteroj — iom nenecesa antaŭzorgo, ĉar Suzano tute ne konis lian skribmanieron — kaj enpoŝtigu ĝin en la vendeja urbo.

—Mi aĉetos por ŝi tre belan — li decidis — girlandon da floroj, aŭ ion similan, kaj la kompatindulino restos feliĉa dum tagoj, provante diveni kiu ĝin sendis. Ŝi povos fanfaroni super tiuj du nevinoj almenaŭ unufoje!

Je tiu sama posttagmezo li plenumis la decidon. Demetinte orde ĉe la poŝtoficejo la leterojn kolektitajn el diversaj kamparaj leterujoj dum lia dua rondvojaĝo, li eniris butikon de papervendisto kaj kuraĝe petis vidi «valentinojn».

—Ni preskaŭ neniam vendas tiujn objektojn nuntempe —

diris la supermiena junulino malantaŭ la montrotablo—. Ni havas kelkajn, sed efektive ne plaĉas al ni tia komercaĵo.

Ŝi elmontris antaŭ la malkontentaj okuloj de Kando kelkajn krudkolorajn monstraĵojn; jen ruĝnazaj policanoj, ebriaj soldatoj, infanetoj falantaj el puŝveturiloj, kaj similaj, ĉiu specimeno kun taŭga surskribo.

—Ne, mi ne volas ion similan—, diris la poŝtisto—. Mi volas ion vere ŝatindan, florojn aŭ ion tian.

—Kompreneble ni havas nasktagajn salutkartojn — rediris la supera junulino. Ŝi estis turnonta sin kiam Kando haltigis ŝin.

—Ne, ne, fraŭlino; mi ne deziras nasktagan salutkarton. Mi volas valentinon, veran malnovmodan valentinon, tian, kian oni dissendadis kiam mi estis juna.

—Estas skatolo kun kelkaj tiaj lasitaĵoj sur la plej supera breto, mi kredas — diris la estro de la butikoj, kun iom amuzata ŝajno—. Mi okaze vidis ilin antaŭ du-tri tagoj. Eble Sro. Kando trovos inter ili ion, kio plaĉos al li.

Oni alportis la skatolon kaj metis ĝin antaŭ la poŝtiston. Ĝi enhavis ĉiajn kuriozajn bagatelojn, inter kiuj troviĝis kelkaj nepuraj kaj sulkigitaj valentinoj de pasinta modo, tiaj, kiajn li iam vidis en la mano de sia bela, juna fratino Beto, kiu mortis antaŭ longe. Post iom da hezito, li elektis la plej prezentindan, objekton kun puntbordero, al kiu estis fiksita aro da rozoj, kun mallargaj bluaj rubandoj, realaj silkaj rubandoj, vagantaj ĉirkaŭ ĝi kaj finiĝantaj per banto.

(*Daŭrigota.*)

LOUISE BRIGGS

ESPERANTISTA LINGVA KOMITATO AKADEMIO

OFICIALAJ SCIIGOJ DE LA AKADEMIO

Unu el la taskoj de la Lingvaj Institucioj estas, laŭ la unua artikolo de la Regularo, kontroli evolucion de la lingvo.

Por plenumi tiun taskon, la Akademio decidis starigi Sekcion de Kontrolo, direktitan de Akademiano, aŭ de korespondanto speciale elektata.

TASKO

Tiu Sekcio nek aprobas, nek malaprobas, ĝi nur konstatas:

1.—Ĉu, en la vortaroj, al ĉiu esperanta vorto respondas taŭga nacilingva vorto; ĉu estas montritaj la oficialaj vort-radikoj; ĉu estis prezentitaj al la Sekcio «Komuna Vortaro» la neoficialaj;

2. — Ĉu, en ŝlosiloj, estas nur oficialaj vort-radikoj;

3. — Ĉu, en lerno-libroj, la fundamentaj gramatikaj reguloj estas montritaj kaj taŭge klarigitaj; ĉu la lingvaj respondoj de Zamenhof estas utiligitaj; ĉu ekzemploj estas eltiritaj el la plej famaj verkoj;

4. — Ĉu instru-metodoj kaj programoj de ekzamenoj por ricevo de diplomoj estas aprobindaj;

5. — Ĉu, en gazetoj, libroj kaj broŝuroj (escepte la teknikajn) troviĝas neoficialaj vortoj (kaj kiuj), kaj frazoj entenantaj gramatikajn erarojn, aŭ nekompreneblaj.

FUNKCIADO

La Sekcio de Kontrolo ne publikigas la konstatojn; ĝi nur sciigas pri ili la kontrolitojn, kaj, se temas pri publikigaĵoj, la sekciojn «Komuna Vortaro», «Gramatiko», kaj «Teknikaj Vortaroj» por eventuala utiligado.

Ĉiujare la Direktoro redaktas Raporton, en kiu li montras la faritajn laborojn, kaj provas eltiri el la Konstatoj konkludojn pri instruado kaj uzado de la lingvo en la diversaj landoj, kaj pri ĝenerala evolucio de Esperanto. Tiu-ĉi Raporto estas publikigata kiel la Raportoj de la aliaj sekcioj de la Akademio.

KONTROLISTOJ

Ekzamenas vort-radikon aŭ ŝlosilon kontrolisto, kies nacia lingvo estas tiu de la aŭtoro, kaj, se eble, kiu jam starigis tiaspecan verkon; li rajtas peti kunlaboradon de samlingvaj esperantistoj, sed li sola respondecas pri valoro kaj konkludoj de la kontrolo.

Ekzamenas lerno-libron nacilingve redaktitan kontrolisto, preferinde profesia instruisto aŭ profesoro de lingvo aŭ gramatiko, kaj kies nacia lingvo estas tiu de la aŭtoro; tiu-ĉi kondiĉo ankaŭ estas dezirinda por kontroli lerno-libron aŭ prilingvan artikolon esperante redaktitan.

Kontrolon de instru-metodoj kaj programoj de

ekzamenoj efektivas kontrolisto, ankaŭ preferinde profesia instruisto aŭ profesoro, kies nacia lingvo estas tiu de la Societo aŭ Instituto, kiu uzas tiujn ĉi metodojn aŭ disdonas tiujn ĉi diplomojn. La Kontrolo okazas nur laŭ peto, aŭ almenaŭ konsento de la koncernita organizaĵo.

Kontrolistoj de la publikigaĵoj estas preferinde la recenzistoj de la esperantistaj gazetoj pro ilia sperto, kaj ĉar profesie ili havas je sia dispono multajn publikigaĵojn. Sed ankaŭ laŭokaze povas kontroli lingvakomitatoj kaj eĉ esperantistoj scipovantaj lingvon.

INICIATO DE LA KONTROLO

La kontrolistoj estas principe komisiataj de la Direktoro por difinitaj kontroloj. Sed estas dezirinde, ke ili mem laŭokaze decidu kontroli la verkojn, kiujn ili havas je sia dispono. Ekzemple la recenzistoj povas facile, kaj sen plua grava peno, kontroli, je la vidpunkto de la Sekcio de Kontrolo, la verkojn, kiujn ili recenzas je la literatura vidpunkto — aliparte jam kelkaj tion faras.

Ne gravas, ke iu verko estu plurfoje ekzamenata; kontraŭe, komparo de la rimarkoj estos tre interesa kaj utila.

Aŭtoro, kiu deziras, ke lia verko estu ekzamenata, sciigas la Direktoron; li sendu unu ekzempleron al la kontrolisto, kies nomon kaj adreson konigos al li la Direktoro; tiu ĉi kontrolisto konservos tiun ekzempleron. Se la verko ne estas publikigita, la aŭtoro sendu pres-provaĵojn por certigi, ke la verko estos publikigata, kaj ke la laboro de la kontrolisto estos utila.

La aŭtoro rajtas publikigi la konkludojn de la kontrolo, komunikitajn al li, kiel ni diris ĉi-supre.

RAPORTOJ

La Raportoj estu sendataj senpere al la Direktoro de la Sekcio de Kontrolo, 35, rue du Sommerard, Paris-5e. Ili estu redaktataj kiel eble plej mallonge kaj klare. Pri tio la Direktoro sendas, laŭ peto, konsilojn kaj sciigojn al la kutimaj aŭ okazaj kontrolistoj.

La Prezidanto,

M. ROLLET DE L'ISLE

26^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

4-11 aŭgusto Stockholm

Sveda Esperanto-Federacio, kiu invitis la 26-an Universalan Esperanto-Kongreson en Stokholmon, povas raporti pri neordinaraj progresoj en la februara numero de Sveda Esperanto-Gazeto. Ne malpli ol «18 novaj Esperanto-kluboj» aliĝis al tiu federacio komence de tiu ĉi jaro. Tiaj sukcesoj montras plej bone la aktivecon de niaj svedaj samideanoj. Ili sin tiel energie preparas por la kongreso, ke ni ĉiuj devas aliĝi por rekompenci iliajn klopodojn sed ankaŭ por akiri interesajn vivspertojn pri la nordo de Eŭropo!

Interesa kongresreklamo estas preparita por la 26-a en Stockholm. Ĝia LKK nome pretigis prelegmanuskripton pri la kongresurbo kaj Svedlando kaj senpage disponigis la prelegon kune kun bela lumbildofilmo aŭ baloptikonaj bildkarto al la eŭropaj Esperanto-societoj. Tiuj estas informitaj pri la ebleco prunte akiri la materialon al la lokaj grupoj.

Se vi volas aliĝi al la Stokholma kongreso, provu tion fari nun tuj, ĉar ĝis la 31-a de marto validas la rabatita kongreskotizo de 20 sved. kro. Post tiu dato validos la ordinara kotizo de 25 sved. kr.

26-a Universala Kongreso de Esperanto. — Fredsgatan 4, Stockholm. — Poŝtĉekkonto 50443.

Loĝejo-prezoj. — Ĉiuj hoteloj, kie ni havigis ĉambrojn por la kongresanoj, estas kontrolitaj de reprezentanto de LKK. Ni konstatis, ke ĉie regas ordo kaj pureco, kaj ke la kongresanoj devas mendi loĝejon por la tuta kongrestempo (de la 4-a de aŭgusto tagmeze ĝis la 11-a de aŭgusto posttagmeze), do por entute 7 tagnoktoj. Se iu deziras por pli mallonga tempo, ni devos kalkuli je iom pli altaj prezoj.

La ĉi-subaj prezoj enhavas pagon por 7-tagnokta loĝo kaj por ĉiuj trinkmono. La tuta restado dum la kongresa tempo koncerne loĝon estas kovrita per enpago de decidita mono. Sed neniu manĝo estas enkalkulita. (Matenmanĝo kostas en la hoteloj 1—1.25 sved. kr.)

Loĝo dum 7 tagoj:

A. Lukshoteloj: 70.—sved. kr.

B. Grandaj hoteloj, kie al ĉiu ĉambro apartenas aparta ban-

- Ĉambro aŭ duĉambro kun fluanta varma kaj malvarma akvo: C. 1. Ĉambro unulita 42.—sved. kr.; B. 2. Ĉambro dulita 91.—sv. kr.
- C. Malgrandaj hoteloj, kie en ĉiu ĉambro estas fluanta varma kaj malvarma akvo: C. 1. Ĉambro unulita 42.—sved. kr.; C. 2. Ĉambro dulita 84.—sv. kr.
- D. Malgrandaj hoteloj, sen fluanta akvo: D. 1. Ĉambro unulita 35.—sved. kr.; D. 2. Ĉambro dulita 70.—sved. kr.; D. 3. Ĉambro trilita 84.—sved. kr.; D. 4. Ĉambro kvarlita 112.—sved. kr.
- E. «Hejmo por virinoj». Ĉambroj kvarlitaj. Malgranda nombro. Prezo popersone: 17,50 sved. kr.
- F. Loĝoj en diversaj ŝtataj aŭ privataj societoj. Ĉambroj 4-ĝis 6-litaj. Limigita nombro. Prezo popersone 17,50 sv. kr.
- G. Loĝo en kazerno. Prezo popersone 11,20 sved. kr.
- H. Loĝo en privataj familioj. Prezo popersone 21.—sved. kr.

Frua mendo estas rekomendinda, ĉar ni provos havigi la plej bonajn ĉambrojn al la mendontoj. Per frua mendo vi ankaŭ faciligos nian laboron.

Allogajn postkongresajn vojaĝojn aranĝos Esperanta Turista Komisiono. — La Universala Kongreso finiĝos la 11-an de aŭgusto. Jen la ekskursaj eblecoj:

- A. 11.—18. 8. al Laponio (Kiruna, Abisko, Porjus, Narvik), 1500 kilometra vojaĝo norden de Stokholmo, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono. Prezo proks. 150 sved. kr. Limigita nombro.
- B. 11.—15. 8. al Jemtland (Are, Trondheim), 900-kilometra vojaĝo nordokcidenten de Stokholmo, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono. Prezo proks. 80 sved. kr.
- C. 11.—15. 8. al la insulo Gotland (Visby), vojaĝoj, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono, en la plej malkara klaso 35 sved. kr.

Antaŭkongresoj. — a) Malmö (Svedujo). b) Göteborg (Svedujo). c) Oslo (Norvegujo).

Postkongresoj. — a) Tallinn (Estonio). b) Helsinki (Finlando).

Ĉiu kongresano ricevos informojn kaj aliĝilojn al la koncernaj kongresoj.

Loka Kongresa Komitato

KONTRAŬMILITEMA KANTO

Sufiĉaj jam mortis, sufiĉaj suferis
 laŭ plaĉo de l'diplomatio!
 Sufiĉaj el niaj infanoj oferis
 ni al la milita falsdio!
 Sufiĉe la blinda perforto detruis!
 Sufiĉe da sango popola jam fluis!
 Ne klaĉu pri reĝo, patrujo kaj gloro:
 ni dankas pro tia honoro!

Gepatroj, vidvinoj, georfoj — en preĝoj
 vi veran konsolon ne trovas,
 ĉar viajn mortintojn la dioj kaj reĝoj
 redoni al vi ne scipovas!
 Vi tute ne ŝatas la kriman militon:
 al vi ne alportas ĝi iun profiton!
 Ekkriu je nova milit' en la landoj:
 «Batalu militprofitantoj».

For ĉiuj pafiloj! For ĉiuj kanonoj!
 For ĉiu mitral' kaj haladzol!
 La ŝtalajn armilojn nun ĉiujn ni, homoj,
 reforĝu plugiloj de l' paco!
 La paco tutmonda ne restu ĥimero:
 ekregu la Amo nun sur nia tero!
 Por nia homar' la milit' estas honto
 kaj ĉies patrujo — la mondo!

JAN VAN SCHOOR

ZAMENHOF AJ VORTOJ

«Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank'al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkoti homon, kiu posedas perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon, sed kiam ĉiu el ni devos ellernadi nur *unu* fremdan lingvon (kaj ankoraŭ tre facilan), ĉiu el ni havos la eblon ellerni sian lingvon funde, kaj ĉiu lingvo, liberiĝinte de la premado de multaj najbaroj, kaj konservinte plene por si sola ĉiujn fortojn de sia popolo disvolviĝos baldaŭ plej potence kaj brile.»

BIBLIOGRAFIO

Estona Antologio. — Unua parto. Eldonis: Esperanto-Asocio de Estonio. Tallinn, 1932. Redaktita de Antologia Komisiono.

Volumo 136-paĝa, kun «Antaŭparolo», «Mallonga tragardo pri la Estona literaturo», trad. de H. Seppik; «Fabeloj kaj Folkloro»; verkoj, en verso kaj prozo, el dek-unu aŭtoroj, kun iliaj portretoj.

Bonega verko, kies daŭrigon ni deziras vidi tre baldaŭ. La plej granda parto de la traduka tasko estas farita de fratinoj Hilda kaj Helmi Dresen, al kiuj ni sendas koran gratulon. Niaj Estonaj geamikoj bone komprenis, ke «Estona Antologio» estos por ili (kiel por ni katalunoj la «Kataluna Antologio») la plej bona disvastigilo pri ilia nacio kaj kulturo.

Tra sovaĝa Kamĉatko. — De Sten Bergman. El la sveda tradukis Birger Gerdman. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 1. 276 paĝ. Prezo: broŝ. sved. kr. 4,50, tole bind. kr. 6.

Norde de Japanujo situas la duoninsulo Kamĉatko, plena de altaj vulkanoj, krutaj montegoj, grandegaj arbaroj kaj vastaj tundroj.

Tra tiuj sovaĝaj regionoj vojaĝis per tirhundoj kaj sledo la aŭtoro kun sia juna edzino dum du vintroj. Ili loĝis ĉe la indiĝenoj kaj manĝis kun ili, sed ne atinginte vilaĝon ili ofte devis tranokti en libera aero dum akra, rigidiga frostoj. Multfoje la vojaĝantoj riskis siajn vivojn, sed nenio povis ilin deteni de pluaj vojaĝoj kaj esploroj, kaj la ekspedicio kunportis al sia hejmlando rezultatojn kun plej granda valoro el scienca vidpunkto.

La vivoplena rakonto pri la aventuraj veturoj dumvintraj trovis la plej grandan atenton en la tuta mondo kaj la libro estas aperinta en 12 lingvoj.

Ĉis nun la esperanta literaturo ne posedis tian modernan vojaĝpriskriban libron, sed per la mondfama libro de Dro Bergman ni ekhavis ne nur science fidindan verkon pri malproksima, nekonata lando kun ĝiaj strangaj popoloj, kulturo, bestaro k. t. p., sed ankaŭ interese gan libron plena de mirindaj travivaĵoj kaj aventuroj.

La libro estas presita sur eleganta papero kaj ilustrata

per multaj bildoj laŭ fotografaĵoj prenitaj de la aŭtoro mem kaj liaj kamaradoj.

Jane Eyre, de Charlotte Brontë. El la angla lingvo tradukis H. J. Bulhuis, L. K. Eldonis: W. J. Thieme & Cie., Zutphen, 1931.

Grandformata volumo, 496 paĝa, kun bonega traduko de tre leginda romano pri la ĉagrenoj de angla knabino. En tiu interesa verko oni povas observi tipajn anglajn morojn.

La entrepreno traduki tian romanon estas grandioza kaj la treege laborema samideano Bulhuis meritas sinceran gratulon. Kompare al la dikeco de la volumo, estas en ĝi malmulte da prezeraroj. Kaj la stilo estas korekta, kvankam ni povas fari la jenajn riproĉojn.

Oni uzas «akurata» anstataŭ «zorga»; «darfi» anstataŭ «rajti» («ŝi ne darfis paroli laŭtvoĉe»); «erarebla» kaj «velkebla» anstataŭ «erarema» kaj «venkema»; «oferi» anstataŭ «proponi»; «ĉirkaŭe» anstataŭ «proksimume». Ni ne ŝatas la formon «akompanino» por «kunulino» aŭ «akompanantino», nek la formon «ekde» por «de post»; en la frazo «mi estas feliĉa ĝis en la plej profunda loko de mia koro», ni ŝanĝus la esprimon «ĝis en» per «ĝis» aŭ almenaŭ per «ĉe en»; en la paĝo 325 mankas akuzativo: kaŝi por vi la proksimeco; en la paĝo 347 troviĝas la jena frazo: «kiam la rememoro puŝis ĝin ankoraŭ pli profunden ĝis en mian koron», kie la tradukinto forgesis ke post prepozicio «ĝis» ne devas esti «n». Plie, ni skribus «ĝis mia koro» kaj ne «ĝis en mia koro». Finfine ni diru ke la plej elegantaj formoj estas: «la rememoro puŝis ĝin ankoraŭ pli profunden en mian koron».

Wörterbuch Esperanto-Deutsch, von Dr. Emil Pfeffer. Tagblatt-Bibliothek nr. 335. Leipzig. Bonega vortaro. Ni rimarkis la adjektivon «arja», kiu certe ne povas manki en vortaro farita en la lando de Hitler.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto, de la samaj aŭtoroj kaj eldonejo, 184 paĝoj kaj 20,000 germanaj vortoj.

Universala Terminologio de la Arkitekturo. De F. Azorin, arkitekto. (2,000 vortoj kaj 2,000 desegnoj, pri arkeologio, arto, konstruo kaj metio). Madrid, 1932.

Volumo 216—paĝa, tre alloga. Ĉiu vorto, krom desegnaĵo, havas esperantan difinon kaj tradukon en almenaŭ ses naciaj

lingvoj. Eĉ por nefakulo tiu verko estas tre instrua kaj interesa. Ni kore gratulas amikon Azorin, el Kordovo, kiu, krom lerta arkitekto kaj fervora esperantisto, estas socialista deputito ĉe la hispana Parlamento. (Recenzo ricevita en oktobro 1933).

Vocabulari Francès Català «del Curs de Conversa Linguaphone Francès i 30 lliçons de Gramàtica Francesa amb llista dels verbs irregulars». The Linguaphone Institute, carrer de València, 245, Barcelona.

Luksa volumo 100 paĝa, lernolibro pri franca lingvo por katalunoj. En la zorge verkitaĵoj klarigoj oni rimarkas la sperton de amiko Delfi Dalmau, kiu, en sia «Liceu Dalmau», instruas kaj disvastigas Esperanton apud la ceteraj lingvoj.

Esperanto, Idioma Auxiliar Internacional, Ejercicios y Diccionario, de Manuel Caplliure Ballester, València, 1933.

Tre bona lernolibro pri Esperanto, por hispanlingvanoj. La tricent paĝoj montras la fervoron kaj laboremon de amiko Caplliure. Mi skribas «amiko Caplliure», kvankam de antaŭ multaj jaroj mi ricevis neniun sciigon de li. Iam, vizitante la Valencian Esperanto-Grupon, mi, post tuta nokto da sendorma vojaĝado, iom nekorekte sed ne malbonintence rifuzis (aŭ pli bone prokrastis ĝis alia okazo) enskribi genian penson en la oran libron de la Grupo... kaj mi ofte pensis ĉu tio ĝenis amikon Caplliure. Mi ne havis okazon denove veturi Valencion, sed mi memoras, ke mi ŝuldas danksubskribon al la Valencian Grupo. Plie mi rimarkas, ke en la vortaro de nia eminenta amiko ne mankas ja la vorto «pardon!».

Eterna Bukedo. K. Kalocsay. Poemoj el dudek-du lingvoj. Eldonis: Literatura Mondo, Budapest, 1931.

Luksa volumo kun 350 paĝoj, kiu por poeziamanto certe estas la plej valora aperinta ĝis nun en la internacia lingvo.

La verko — riĉega, eksterordinara, kolora — estas dediĉita al la memoro de Antoni Grabowski. Ni ne volas ofendi la memoron de la granda polo, sed la verko de la hungaro Kalocsay superas, el ĉiuj vidpunktoj, la verkon «El Parnaso de Popoloj». Oni povas riproĉi al Kalocsay troajn neologismojn, sed pli multajn liberecojn pretendis la genia tradukinto de «Sinjoro Tadeo». Ni devas klopodi, ke inter la ĉiu-

taga Esperanto kaj la literatura lingvo internacia estu kiel eble plej malgranda diferenco.

Tiuj nacilingvaj verkistoj, kiuj plendas ke en Esperanto oni «faras literaturon», ĉesus en siaj nesagaj kritikoj, se ili kapablas kompreni nur la duonon de la beleco troviĝanta en tiu «Eterna Bukedo», kiu vere enhavas la parfumon de ĉiutempaj kaj ĉiulandaj literaturoj, kvankam la elekto de la tradukitaj poemoj ne estas proporcia al la literatura merito de la diversaj lingvoj. Ekzemple: estas nur kvar tradukoj el la hispana lingvo kaj tute mankas traduko el la kataluna kaj provencala lingvoj. Tamen mi ne riproĉu pri tio: se mi estus povinta sendi pli rapide tekstojn al Kalocsay, eble li estus tradukinta almenaŭ unu katalunan poemon de Joan Alcover, same kiel Grabowski enmetis en sian «Parnason» unu pecon de Jacint Verdager. En la paĝo 334, Kalocsay enmetas mian nomon en la liston de alsendintoj de originalaj tekstoj, klarigintoj de malfacilaj lokoj kaj kontrolintoj de fideleco, sed verdire mi helpis lin, eĉ tre detale, koncerne la hispanan lingvon kaj nur en la lasta momento sendis al li katalunan tekston. Jen pruvo ke ni katalunoj ne estas ekskluzivistoj.

Multaj mirigajn tradukaĵojn mi trovis en «Eterna Bukedo», sed mian plej profundan admiron vekis traduko de «La Korvo», de la anglalingva Poe. Ankaŭ elstaras: «Sola dum drinko sub la luno», de Li Tai Po; «Kvina Kanto» de la «Infero», de Dante; «La Priorino», de Chaucer; «Epitafio», de Villon; «Sonetoj», de Shakespeare; «La papilio», de Lamartine; «La bovo», de Carducci; «Kanto de hundoj», kaj «Kanto de lupoj», de Petöfi.

El la 138 neologismoj uzataj de Kalocsay, mi malaprobas la jenajn: gapi, fuĝi, treti, tenera, fajna, povra kaj tepida.

Mi ne ŝatas la formojn virgino kaj ekde.

En la paĝo 300 mi trovis: «pokalo plenigita ĝis trans sian bordon», kie estas triobla eraro. Unua eraro: «ĝis trans la bordo» estas nenecesa, ĉar sufiĉas «ĝis la bordo». Dua eraro: «sia» devas esti anstataŭata per «ĝia». Tria eraro: post «ĝis» ne devas esti «n» de almovo.

JAUME GRAU CASAS, L. K.